



1(179)
2021

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas:	ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi:	str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

La portempa kanzono, kiun esparanta komunumo sendis al bjalistokaj samideanoj:

La kvaranteno por ni

Vi lavu ĉiom!...
Ne multe krom...
Ne faru, ne iru, ne ternu, ne diru
Kaj restu en dom'!

Saluton, la VIVO, saluton, REVENO
Saluton ESPERO dum la KVARANTENO!
Saluton la SANO, saluton HUMORO
Saluton, ESPERO, de vivo TREZORO!

La domo kaj Vi
Kiel bela ĝi!
Ni povas labori kaj pensi, memori
Kaj lerni pli...

Saluton LABORO kaj la AMIKECO
De vivo FAVORO, de vivo BELECO!
Saluton, AMIKOJ, saluton, la HOMOJ
La plenaj de ESPER', feliĉaj en DOMOJ!

Ŝanĝiĝas la mond',
De vivo rond'
La kapo, la koro, la lingvo, parolo
Por Vi – respond'

Saluton, la VIVO, saluton, REVENO
Saluton ESPERO dum la KVARANTENO!
Saluton la SANO, saluton HUMORO
Saluton, ESPERO, de vivo TREZORO!

Kwarantanna dla nas

Myj się do stóp aż,
Nie tylko twarz!
Nie kichaj, nie pryčaj, nie ziewaj, nie śpiewaj;
I w domu być masz!

Niech nadal trwa życie i trwa nieustanna
Nadzieja, że skończy się ta kwarantanna!
Niech trwa zdrowie, humor i radość istnienia
Te skarby niezmiennie, gdy wszystko się zmienia.

Dom wiele ma dać:
Masz w nim jeść i spać,
Nie możesz się włączyć, lecz możesz się uczyć,
O rozwój dbać.

Niech nadal trwa praca i przyjaźń serdeczna
I iskra nadziei do życia konieczna;
Bo życie jest piękne i nikt się nie dziwi,
Że i w kwarantannie jesteśmy szczęśliwi.

Świat już nie ten sam,
Zmienia się nam
I serce i głowa, działania i słowa;
Radę ci dam:

Niech nadal trwa życie i trwa nieustanna
Nadzieja, że skończy się ta kwarantanna!
Niech trwa zdrowie, humor i radość istnienia
Te skarby niezmiennie, gdy wszystko się zmienia.

Maria Marphy – nia usona amikino



Maria Murphy (1.10.1938 - 19.01.2021). Pro la komplikaĵoj post Covid19-infekto, en Florido mortis d-rino Maria Murphy (nask. Liwszyc), 82 jara vere internacia esperantistino. Ŝi naskiĝis tuj antaŭ la komenco de la Dua Mondmilito en Varsovio, (Pollando), en la juda familio. Dum la holokaŭsto ŝi estis savita fare de la polaj katolikoj. Post la milito Maria rekuniĝis kun ŝia patrino, kun kiu ŝi translokiĝis al Israelo, dum poste ŝi edukiĝis ree en Eŭropo, finstudinte medicinon en Romo, ŝi praktikis medicinon en Usono. Maria Liwszyc edziniĝis al la usona esperantisto Ralph Murphy. Dum ŝia tuta vivo la Internacia Lingvo Esperanto estis ŝia fervora pasio.

Kvankam ŝi neniam oficiale aktivis en iu esperantista organizo, ne laciĝadis informi pri Esperanto ĉiujn neesperantistojn, kun kiuj ŝi facile faradis kontaktojn. amikeme kaj ĝue ekkonadante novajn personojn. Ŝi estis nomata "Mrs. Esperanto" de ŝiaj najbaroj kaj aliaj usonaj konatoj. Kun Esperanto ŝi vaste vojaĝis tutmonde, partoprenante en la Universalaj Kongresoj kaj aliaj aranĝoj. Ŝia nomo troviĝas kiel Delegito kaj Fakdelegito de Universala Esperanto Asocio, listigita en ties Jarlibro. Post la morto de la edzo Ralph ŝi vivis sola en la granda domo en Englewood, FL, kiun ŝi mem nomis "Esperanto-Domo". Maria ĝuis gastigi tie plurajn esperantistojn, eĉ kun familioj. La domo, bele situata sur la bordo de la oceana golfo, estis plena de esperantaj libroj kaj aliaj kolektaĵoj akiritaj de ŝi tutmonde dum la jardekoj de ŝiaj esperantistaj vojaĝoj kaj korespondaj kontaktoj. Krom Esperanto ŝi estis flua en ŝia denaska pola lingvo. Ŝi ĝuis iu ajn nacian kulturon, kaj simile ŝi sentis sin komforte en iu ajn religio. Ŝi vizitadis variajn templojn kaj sinagogojn kaj plej aktivis en la loka Unitarian Church. Ŝin travivis ŝiaj du fratinoj Zofia kaj Irka, kaj du filoj, Joseph kaj David, kun iliaj infanoj. La modesta funebra ceremonio okazis sabate, la 23an de Januaro, 2021 en Englewood, FL, en la favorata de ŝi Indian-Mound Parko najbare al ŝia domo. La ceremonio estis disaŭdigata pere de ZOOM kaj YouTube. Anstataŭ floroj oni petis donacojn al Esperanto Ligo de Norda Ameriko

<https://www.esperanto-usa.org/eusa/en>

D-ro Leszek Kordylewski
Prezidinto de Esperanto Societo de Chicago

Lafcadio Hearn

Kwaidan. Rakontoj nekutimaj.

Oshidori

En distrikto Tamura-no-Go, en provinco Mutsu loĝis iam falkisto kaj ĉasisto je la nomo Sonjo. Iun tagon li iris ĉasi, sed tamen nenion ĉasis. Revenante hejmen, en loko nomata Akanuma li rimarkis naĝantan tra la rivero paron de oshidori (de mandarenasoj). Mortigo de mandarenasoj nenion bonan aŭguras, sed Sonjo estis tre malsata. Lia plumsago trafis la anasviron, kaj ĝia kamaraĉo fuĝis kaj malaperis en junko. La ĉasisto prenis la mortan birdon hejmen kaj tie ĝin kuiris.

Nokte li havis mornan sonĝon. Li sonĝis, ke ekvidis en sia kamero belan virinon, kiu ploris tiel amare, ke li sentis kvazaŭ iu forŝiradis al li la koron el la brusto. Kaj la virino al li riproĉis: "Ho, kial? Kial li vin mortigis? Pro kia krimo li kulpis? Ni estis komune tre feliĉaj, kaj vi lin mortigis! Ĉu li faris al vi kiam ajn ion malbonan? Ĉu vi scias, kion vi faris, kian kruelan kaj fian agon vi plenumis? Min vi ankaŭ mortigis, ĉar mi plu vivi sen mia edzo ne scipovas!" Kaj denove ŝi elŝprucis per la plorego kaj diris: "Vi ne scias, vi ne povas scii, kion vi faris. Sed morgaŭ, kiam vi iros al Akanuma, vi ĉion ekkomprenos. Ĉion..." Post tiuj vortoj ŝi foriris.

Kiam Sonjo vekigis aŭrore, sentis sin tre malkvieta. Senprokraste li intencis iri al Akanuma. Kiam li ekstaris sur bordo de la rivero, li rimarkis naĝantan solece anason. Ĝi ankaŭ lin rimarkis kaj anstataŭ fuĝi eknaĝis en lian direkton kaj timige lin rigardis. Subite ĝi per la beko apertis la bruston kaj ĉe li mortis.

Sonjo rememorigis al si, ke de multegaj jaroj tuta Malproksima Oriento traktas anasoj oshidori kiel simbolo de la geedza amo.

Li razis la kapon kaj fariĝis monaĥo.

Papilioj

Post la tombejo ĉe la templo Sozanji, sur antaŭurbo de la metropolo, dum multaj jaroj staris la soleca ĥateto, en kiu loĝis la olda homo je la nomo Takahama. La ĉirkaŭaĵo ŝatis lin pro lia afableco, sed preskaŭ ĉiu opiniis lin iomete freneza. Se ja viro ne votis budhe, oni atendas, ke li edziĝos kaj fondos familion. Sed Takahama ne apartenis al la klera stato, kaj al la edziĝo oni ne sukcesis lin instigi. Oni ne konstatis ankaŭ, por li kiam ajn ligis la aman rilaton kun virino. Pli ol kvindek jarojn li trapasis en la tuta soleco.

Iun someron li ekmalsanis kaj suspektis, ke ne restis jam antaŭ li multe da vivo. Zorgis pri li la vidvino post lia frato kaj ŝia juna filo.

Kiam ian vaporplenan posttagmezon ili vartis ĉe la lito, Takahama ekdormis, kaj en la sama momento al la kamero alflugis granda, blanka papilio kaj eksidis sur lia kuseno. La nevo forpelis ĝin per la ventumilo, sed ĝi tuj revenis. Denove ĝi estis forpelita, sed denove revenis. Forpelita ree ĝi aperis la trian fojon. Tiam la knabo ekkuris post ĝin al la ĝardeno kaj plu, trans la aperta pordego, sur la tombejon ĉe la proksima templo. La papilio flugis apud li, kondukis tiom strange, ke la knabo komencis pripensi, ĉu ĝi estas ordinara insekto, aŭ malbona spirito. Sed li postkuris ĝin plu. Subite, en la fora parto de la tombejo la papilio ekflugis en direkton de iu tombo kaj mistermaniere malaperis. La junulo vane rigardis ĉirkaŭe, kaj poste atente rigardis la monumenton. Li tralegis sur ĝi la nomon "Akiko", nekonatan al li nomon gentan kaj informon, ke ŝi mortis kiel dekok-aĝa. La tomboŝtono estis malnova, muskokovrita, sed zorge flegata. Staris antaŭ ĝi freŝaj floroj kaj ujo kun akvo.

Reveninte ĥaton la knabo sciigis, ke lia onklo eligis la lastan spiron. Sur la morta vizaĝo montriĝis la rideto.

Kiam la junulo rakontis, kion ekvidis sur la tombejo, la patrino diris:

– Vian junan onklon oni fianĉigis kun la filno de la najbaro – ĉarma Akiko. Sed antaŭ la tago de la nupto Akiko mortis pro ftizo. Lia fianĉo ege desperis kaj post la entombigo ĵuris, ke neniam edziĝos. Li konstruis tiun negrandan dometon ĉe la tombejo por senĉese esti proksime de la amatino. Ĉiutage via onklo vizitadis la tombejon, preĝis ĉe la tombo, purigis la tomboŝtonon kaj metis antaŭ ĝin oferojn.

Li ne ŝatis, kiam oni pri tio parolis kaj neniam pri tiu temo kun neniu interparolis. Kaj jen finfine Akiko venis por li – la blanka papilio estis ŝia animo.

Tradukis Lidia Ligeza

Gaston Waringhien

Glosaro al Parnasa Gvidlibro

Nocioj, kiuj ne troviĝas en konataj vortaroj ĝis 1932 j.:

- aĥ!** – esprimo de akra bedaŭro
ambigua – dusenca, dubiga
amoko – murda frenezatako, precipe ĉe malajoj
arida – malfekunda pro troa sekeco
bang! – imito de eksplodo
bereto – platĉapo por viroj aŭ virinoj
bohemio – fantazia, ofte malriĉa vivmaniero de artistoj
brikabrako – fatraso de antikvaĵistaj kuriozaĵoj
budeno – sangokolbaso
bugri – anuskoiti
ĉardo – stepa aŭ kampara drinkejo, precipe hungara
ĉipa – malmultekosta
defetisto – pesimisto, anticipe preta akcepti malvenkon
desaponti – seniluziigi
diskordo – malkonkordo
dispensi – liberigi, malŝarĝi (je devo, peno ktp)
dista – malproksima
egotismo – elekto de la memo kiel bazo de moralo aŭ estetiko
ek! – instigo al ekirigo
eosto – orientflanko
erudi – plejfunde kaj detale instrui
falva – tre hele flava
farniento – nenifarado
folo – frenezeta; frenezon ŝerce imitanta
gelo – frosto
giri – rondiri
graŭli – kolermurmuri
grefo – ungego
hati – malami
horto – fruktoĝardeno
huligano – kruda, kontraŭsocia laborevitulo
ĥato – vilaĝa pajlotegmenta dometo
invoki – ateste alvoki
joviala – temperamente gaja
kiĉo – filistra artaĵo, plaĉa nur al malbongustuloj
klaroskuro – kontrasto de lumoj kaj mallumoj sur pentraĵo
kojono – testiko
konvaleski – transiri de malsana al sana stato
kuloto – ĝisgenua pantaloneto
kuracao – oranĝa likvoro
limeriko – kvinversa angla ŝerca poemeto
linda – beleta
lukri – perlabori (*monon*)
lukro – enspezo ricevata de la laborado
mava – malbona
midzi – buŝkoiti
minca – maldika
nelge – antaŭ ne longe
nociva – malutila
noko – kuirita pastoppeceto
objeti – kontraŭdiri, kontraŭmeti
opresi – tirane premeigi
palpiti – pulsadi
perkelto – paprika stufita bovaĵo
pita – malgranda
pogromo – amasbuĉado de judoj
poka – malmulta
precioza – rafinita en sia parolo
prefaco – antaŭparolo
primavero – printempo
profidi – malpermesi
pu! – esprimo de naŭziĝo pro malbonodoro aŭ fiĉo
rabeleza – plumpe, ofte krude ŝerca
redempti – religie elaĉeti
Redemptoro – La Elaĉetinto
rehabiliti – redoni al iu erare kondamnita liajn rajtojn aŭ honoron
remburso – pagoŝarĝo ĉe la poŝto
riposti – rebati al antaŭa rebato
ronroni – fari ŝpinan bruon (*kato*)
ruro – kamparo
salamo – seka, malmola kolbaso
sinjoro – sinjora moŝto, mastro
servila – aĉe servema
simultana – samtempa
skotero – speco de motorciklo
slabo – ebena plato el ŝtono aŭ ŝtalo
stinki – malbonodoraĉi
ŝriki – ĵeti akutan, ŝiran ekkrion
trepidi – fortege skutremi
valga – kurbagamba, tondilkrura
vendeto – hereda venĝemo (*precipe korsika*)